# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa, Fakaj kaj Regiona Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 27. Majo 10, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Pezo: Word: 227 KB, Alkroĉaĵo: PL 350 KB. Sume: 580 KB.**

## Mia amiko el Brazila blogisto

Kadre de Programo 'Mia Amiko', mi elpensis ideon por helpi niajn plievoluintajn lernantojn komenci aktivadi (ĉar la aktivado motivas ilin resti en la movado). Do, mi ĵus kreis la blogon "EL BRAZILO" por prezenti resumojn en Esperanto de interesaj artikoloj, kiuj aperas en la Brazila gazetaro. Dum jaroj ekestis kelkaj problemoj por tion fari:

1. Dekomence, la homoj timas komenci skribi en Esperanto;
2. Malmultaj estas kapablaj fari bonajn resumojn de ĵurnalaj artikoloj;
3. Ne ĉiuj scias fari bone prezentitajn blogojn.

## Facila.org: ...'per flugiloj de facila vento…'

La retejo <UEA.facila.org> indas vian atenton.

https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/du-bestoj-kun-pikiloj-r360/

Kurs-gvidantoj kaj instruistoj povas uzi utile tiun retejon, por aliri trezorejon da tekstoj/

## Eblas iĝi dumviva membro de IKEF

IKEF estas nia faka asocio pri ekonomio. Ĝi ĵus akiris dumvivan membron. Tio kostas nur €200, do aliaj pripensu tiun eblon.

Ĵusa dumviva membro de IKEF
S-ro ABIODUN SAMUEL ADEBOWALE, <SADEBOWALE@PROTON.ME>
dankon pro via pago de €200,00 — dumviva membreco—

IKEF respondis al Abiodun, kiu loĝas en Madrido, Hispanio, por kore danki lin.

IKEF plej fortas en Azio, kaj plej malfortas en Eŭropo! Sed nun ili havas fenestron al Eŭropo!

## La romano de Varankin en nederlanda traduko




La renoma romano de Vlalidimir Varankin estis laŭ William Auld nesufiĉe alte taksita.

Temis pri la febre farita laboro por konstrui en Moskvo metroon en la fino de la 30-aj jaroj laŭ la ordonoj de Stalin.

La verko estis tradukita al la nederlanda de A.Kooij-van Holst kaj kontrolita de Bert de Wit. La Esperanta versio estas mendebla de la Libroservo de UEA: https://mallonge.net/233kuea

SMG legis ĝin antaŭ 40+ jaroj kaj ege rekomendas ĝin.

Informoj laŭ la informilo el Nederlando

## Komitato pri lingvoj celo por Eo-agado

En julio 2022, la Komitato kunvenigis flankan aranĝon de la Altnivela Politika Forumo kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio kaj la Konstanta Misio de Hispanio al Unuiĝintaj Nacioj kun fokuso je la graveco de lingvoj kaj multlingvismo por CDE 4 (Bonkvalita Edukado). La aranĝo konsistis el fakulaj prezentoj de prof. Jasone Cenoz (Universitato de la Eŭska Regiono, Hispanio), prof. Mark Fettes (Universitato Simon Fraser, Kanado), kaj d-ro Xolisa Guzula (Universitato de Kaburbo, Sud-Afriko), kun bonvenigaj rimarkoj de Guillermo Escribano (Ĝenerala Direktoro de la Programo Hispana Lingvo Tutmonde, en la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, Hispanio).

## La israela kongreso kaj ekskurso



Lastvendrede finĝis la postkongresa ekskurso de la 23-a Israela Kongreso okazinta en Tiberiado inter la 13-a kaj la 16-a de aprilo 2023 kun pli ol 30 partoprenantoj (13 el eksterlando). La riĉa okazinta programo videblas en la IK-retejo, http://esperanto.org.il/ik23.html#programo.

La tradicia post-kongresa ekskurso daŭris 6 plenplenajn tagojn kun 12 partoprenantoj. La mirinda vojaĝo, kiu pasis kvar marojn (Galilea, Morta, Ruĝa kaj Mediteranea), vizitis ekzotikajn lokojn kiel Jeriko, Masada (sur la bildo), Wadi Rum, Petra, Eilat kaj fine Jerusalemon kaj Tel-Aviv-Jafon.

## Naivaj ŝerĉoj el Hispanio

Jen la kvina aro da grafike prezentitaj ŝercoj… ĉi-foje iom naivaj: https://youtu.be/2plwDK8ssRQ

mga

# La Esperanta Urbo prizorgadas kursojn

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Esperanto-Centro Herzberg
Gvidantonomo: Peter Zilvar
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko: Herzberg am Harz, Germanio

Aldoninto: herzbergcentro

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27531

========

Nomo: Bildungsurlaub VHS-kurso (Popolaltlerneja)
Gvidantonomo: Zófia Kóródy
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko: Herzberg am Harz, Germanio.
Aldoninto: Katalin

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27532

# Ĉeno utilas en Ĉinio

Jen la kvina epizodo de la Granda Homa Ĉeno de ILEI, de la BEK-kurso de Dennis Keefe al la gestudentoj de Esperanto de Zaozhuang-Universitato.
https://youtu.be/ER1Gy6konJU

Alessandra Madella, ILEI

# Akiru stelo-monerojn




Baldaŭ vi povos en aŭkcio de DOROTHEUM ekhavi Stelo-seriojn:
https://www.dorotheum.com/de/l/8516512/
https://www.dorotheum.com/de/l/8516515/

Walter Klag, Aŭstrio

# Financaj preparoj por UK 2024 en Aruŝa

UEA preparas sian unuan Universalan Kongreson en Afriko (Tanzanio 2024), kaj la juna Afrika Komisiono de UEA laboras por disvastigi kaj instrui Esperanton en ĉiuj afrikaj landoj. Tiucele ili bezonas retan radion, kaj amasfinancado per la retejo Ulule: https://www.ulule.com/radio-esperanto-afrique/ ĵus komenciĝis por kolekti la monon necesan por aĉeto de la materialo.

Dankon se vi povos kontribui en tiu financado (per klakado al la ĉi-supra ligilo) kaj diskonigi ĝin ĉirkaŭ vi (per plusendo de la sama ligilo). Ni esperas, ke la diversaj agadoj, kiujn ni jam nun klopodas en Afriko, ebligos, ke tiu rapide progresanta kontinento okupu la lokon, kiun ĝi meritas en la Esperanto-movado, kaj ke vi multaj partoprenos en la Universala Kongreso de 2024 en Aruŝo en Tanzanio.

François LO JACOMO, estrarano de UEA.

# Ekvadora aktivemo

Guy Matte: 'Hieraŭ vespere, mi havis babilkunvenon kun grupo de Ekvadoraj Esperantistoj (5). Ili volas reaktivigi la movadon en tiu lando, sed ne scias kiel tion fari. Ili pripensos la aferon kaj ni rekunvenos en kelkaj semajnoj. Ili kompreneble interesiĝas pri TAKE kaj pri la ebleco organizi kunveneton en iu parto de Ekvadoro iam dum julio aŭ aŭgusto.'

# Informoj el Poznano, Pollando

1) Ĵus aperis la **kvaronjara bulteno de FIPLV** (Federation Internationale des Professeurs des Langues Vivantes) kun prezento de la **Interlingvistikaj Studoj de AMU**, en Poznano. Vi trovas mian artikoleton sub ILEI, ja ĝi estas membro de FIPLV,:

https://fiplv.files.wordpress.com/2023/05/fiplv-newsletter-issue-1-march-2023_02.05.23.pdf

2) Mi aldonas la informilon pri la **magistraj studoj pri interlingvistiko**, kies denova startigo en 2023 kun internacia studentaro estas vivgrava. Mi petas vian helpon en ĝa disvastigo kaj trovo de junuloj. La studoj donas utiligeblan diplomon por homoj kiuj volas labori en internaciaj firmaoj, redakcioj, turismaj oficejoj… La informilo alkroĉe.

3) Ne forgesu proponi al instruantoj la lastan **instruistan trejnadon en AMU**: http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/INSTR_TREJN_2023_anonco.html

Ilona Koutny

# Komputiko el Hungario

Artikolo pri ChatGPT sur la hejmpaĝo de HEA:
**Tri renkontiĝoj kun amikoChatGPT, la arta artefarita inteligento**
Skribis István SZABOLCS, komitatano A de HEA. Legu la artikolon:
https://esperantohea.hu/esperanto-amiko-chatgpt-la-arta-artefarita-inteligento/

Zoltán BARTA

# Poemo en Hispanio

Miguel Fernández deklamas la poemon "Venkitoj":
https://youtu.be/0H_zpvLzICg

mga

========= vortoj:  935 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Komunikoj el 2023 troveblas ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.